

NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

MAJO 2008

MADRIDANOJ AGADIS

La unua "speciala" **konversacia rondo de MEL** okazis la 7an de aprilo, gvidata de Juan del Castillo kaj kun naŭ ĉeestantoj. Kiel prologo oni babilis pri la lernado de Pedro Zurita de ĉina lingvo. La parolado temis pri la porteblaj telefonoj kaj ties teknikaj implicitaj aferoj (antenoj, transformatoroj, mikroondaj fornoj kaj aliaj domaj elektromagnetaj fontoj). Ĝenerale oni opiniis ilin utilaj, eĉ foje necesaj. Tamen ne ĉiuj posedis unu kaj tiuj tamen, asertis vivi komforte kaj ne ĉagrenite pro ilia manko. Sufiĉe longe oni komentis supozeblajn efikojn de tiuj elektromagnetaj kampoj je la sano kaj ankaŭ plej bonan manieron minimumigi ilin. Oni prezicigis ke trovi rilaton inter kaŭzo kaj efiko ofte malfacilas. Kaj unu temo kondukas al alia kaj nian kunveneton ni finis parolante pri Camino de Santiago kaj ties supozeblaj nenormalaj magnetaj influoj je la pilgrimantoj. MEL invitas vin por la venonta 5a. de majo.

"El Esperanto en el año internacional de las lenguas" estis la titolo de la prelego kiun José Antonio del Barrio donis en la Casa de Guadalajara de Madrido; la nombro de ĉeestantoj estis sufiĉe granda kaj kelkaj el ili demandis pri esperanto kaj ĝia movado.

La 23an de aprilo la Liceo festis la **tagon de la libro** kun budo ĉe strato Fuencarral, unu el la plej frekventataj de Madrido.

Kiel pasintajn jarojn, Círculo de Bellas Artes denove organizis la publikan **legadon de Donkiĥoto** en madrida institucio. Partoprenis en la legado en esperanto tri personoj, la jaŭdon 24-an Aprilo je la 8-a vespere. De antaŭ kelkaj jaroj madridaj esperantistoj partoprenas en la fama evento.

Kupono de ONCE PRI ZAMENHOF

ONCE (la Hispana Asocio de Blinduloj) akceptis la peton de Hispana Esperanto-Asocio kaj eldonos kuponon dediĉita al Zamenhof. Ĝi aperos la sabaton 17an de majo po 1,5 eŭroj.

EN HISPANIO

Dum la unua semajfino de aprilo esperantistoj el **Ciudad Real**, inter ili Raúl, la librotenisto de HEF, organizis ĉarman esperantan renkontiĝon en Ciudad Real, Valdepeñas kaj Almagro. Ankaŭ partoprenis madridaj esperantistoj.

Ekde la 16 a de aprilo, la Esperanta Grupo Antaŭen" de **Avilés**, organizas e-kurson en "asturianu". Pli da informo: antauenaviles@hotmail.com

En **Alicante**, la 25an de aprilo okazis prelego kun debato pri "Esperanto y Movimiento obrero" Partoprenis membroj de la Valencia Esperanto Grupo kaj de la sindikato CGT.

La Biblioteko de Instituto de Enseñanza Secundaria "Mar de Alborán", de **Estepona** (Málaga), inaŭguris esperanto-sekcion pasintfebruare. La libroj estis donacitaj de Malaga Esperanto Asocio kiu ankaŭ organizis kvar prelegojn pri esperanto de Julio Herrero

La ĵurnalo "Hoy Digital" de Badajoz (2008-03-30), aperigis artikolon kun saluto en esperanto.

ESPERANTA MONDO

En la forumoj aperis jena novaĵo: Video por lerni Esperanton.: Mi preparis novan retpaĝon por faciligi la elŝutadon de fama video por instrui Esperanton al infanoj ... sed tiu video jam estis uzata por la "Kurso de Esperanto de la Universitato de Rochester, en la Novjorka Ŝtato, en Usono, en aŭtuno 2006. La tuta video daŭras 77 minutojn. Estas pli facile elŝuti la dosierojn el mia retpaĝo ol el la originala retpaĝo, kiu estas en la angla lingvo, ĉar mia retpaĝo montras ĉiujn dosierojn kun iliaj ĝustaj adresoj. (39 dosieroj entute) Mia retpaĝo havas 3 versiojn: esperanta (e), hispana (h), kaj angla (a). <http://esperantofre.com/edu/kino01e.htm> Vi povas elŝuti : la videon (en 6 partoj). la tekston de la video (en 12 partoj, pdf printeblaj). la vortaron por tiu teksto (en 11 partoj, pdf printeblaj). 4 kvizojn (pdf printeblaj). *Enrique ElleMBERG*.

KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

19-26 julio: 93-a Universala Kongreso de Esperanto. Roterdamo (Nederlando) 26 julio- 1 aŭgusto:

26 julio- 1 aŭgusto. Internacia Junulara Kongreso (TEJO) Szombathely (Hungario)

Hispana Esperanto-Kongreso 2008. Cuenca 3a ĝis la 6a de julio.

Pli da informoj: www.esperanto.es

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Sekretariejo de HEF funkcias, en Rodríguez San Pedro 13, lunde vespere (18,00-20,30h), dum aliaj tagoj: telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es

Dank'al la laboro de la nova librotenisto de HEF, Raúl Martínez, kaj al la helpo de Lupe Sanz, Vic-prezidantino (laŭ ŝi "junulino ĉia ajn", chica para todo) la kontoj-2007 de HEF jam estas ĉe la "Ministerio del Interior". HEF, kiel asocio de publika utileco devas plenumi kelkajn formalaĵojn. Inter ili prezenti la kontojn kaj la memoron de aktivaĵoj.

Laŭ peto de onuba esperantisto HEF prezentis al la "Agencia Tributaria" liston de ĝiaj membroj kun la kvanto de la kotizoj (pro tio oni petis la numeron de DNI). Pro tio en la malneto kiun vi ricevas de "Aeat" aperas dekalkulo (en Madrido 7,75 eŭroj, se vi pagis 31,00)

Demisioj en la Estraro de HEF: post la deziro de la Prezidanto esti anstataŭita en sia posteno, en aprilo demisiis la Sekretariino, la vic-prezidantino kaj la redaktoro de Boletín (tiu ne oficiale). Carmen, pro personaj aferoj demisiis ekde nun, Lupe restos ĝis la Kongreso kaj oni supozas ke Jorge Pavón faros la lastan "Boletín" post la Kongreso. La sekretariaj laboroj estos faritaj de Manolo Parra kaj Lupe. HEF petas kandidatojn por la postenoj kiuj devos esti elektitaj en la Kunveno de Cuenca: Prezidanto, Vic-prezidanto, Sekretario kaj 3 voĉdonantoj, inter ili la redaktoro de Boletín.

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Laj konversacia-rondoj kiujn organizas Madrida Esperanto-Liceo okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3-7 Tel. 91 446 80 79.

La konversacia rondo de la unua lundo de ĉiu monato (5 a de majo) estos gvidata de Juan del Castillo je la 19,00 horo.

KURSOJ:

Vallecas. Pedro Hernández organizas bazan kurson, sabate je la 17,00-a horo kaj je la 18,30-a meza nivelo. Tel. 91 507 90 84/85 kaj 667 721 951

PRELEGOJ:

10an majo: MEL partoprenos en la "Feria de Asociaciones Juveniles de Guadalajara" en la vilaĝo Cabanillas del Campo (apud Guadalajara). Juan del Castillo prelegos pri "Esperanto, lengua y cultura" kaj HEJS, la junulara sekcio de HEF, havos budon kun E-libroj.

Vidu la programon ĉe <http://www.ajmejunje.com/>

La kotizo de MEL por la jaro 2008 estas 12,00 eŭroj

La membroj kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, povas pagi 12 eŭrojn rekte la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro, 13-3º-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid,

Banco Sabadell/Atlántico konto 0081/7110/98/0001266730

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Asociación de Utilidad Pública Municipal

San Alejandro 6- 4ºB EXT

28005 Madrid